

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 312 (79) KVINA EPOKO

SEPTEMBRO 2000

86-a UK EN
ZAGREBO 2

NIA AGADO 3

EŬROPA JARO
DE LINGVOJ 5

KAFE-RAPORTO 6

INTERNACIE 10

EŬROPA
ANGULO 12



ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO



KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO

Apartat, 290 - 08200 - SABADELL
CATALUNYA - KATALUNIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de UEA, FEL, *Literatura Foiro*, IKEL, *La Kancerkliniko*, *La Dua Jarcento (IEM)*, *La Ondo de Esperanto (peras aliajn revuojn)*

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental) Catalunya/Katalunio Tel + Fakso: 93-716 36 33, (ekde lundo ĝis vendredo inter la 17a kaj 20 h.)

Ret - adreso: kea@stel.net

Ret - paĝo: <http://www.stel.net/esperanto/kea>

Kotizoj por la jaro 2000: Individua Abonanta Membro 3.500 p-toj; Individua Subtenanta Membro 7.000 p-toj; Individua Dumviva Membro 70.000 p-toj; Kolektiva Membro 7.000 p-toj; Juna Membro 2.500 p-toj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona - Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Neus Moly; Vicprezidanto: Josep Franquesa; Ĝenerala Sekretario: Xavier Rodon; kasisto: Llibert Puig; Komitatanoj: Lluís Aragay, Mercè Porta, Luz Vázquez, Sun Farràs, Roger Prieto.

Kontrola Komisiono: Miquel A. Altuna, Arnald Massanas, Lluís Armadans

Kataluna Esperantisto: Pere Bernús, Llibert Puig, Marina Ollé, Pako Belmonte

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

Imprès a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

kovrilpaĝo

• La unua foto, tutkolora en la originalo, montras la kovrilon de la KD de la kataluna muzik-teamo **KAJ TIEL PLU**, kiu aperis dum la KAFE-Festivalo en Tuluzo komence de julio.

Ĝi aĉetblas ĉe nia Asocio kaj kostas 2.000 p-tojn, kio inkluzivas sendokostojn.

• La dua foto, ankaŭ kolora en la originalo, montras polan muzik-grupon dum la Festivalo de KAFE
(foto de Joan Inglada)

86-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - ZAGREBO (KROATIO) 21-28 JULIO 2001

Bonvenon al Zagrebo, al la ĉefurbo de Respubliko Kroatio. Zagrebo estas urbo de riĉa historio, de mezepoka etoso, urbo turnita al la estonteco. Ĝi kuŝas sur la deklivo de la monto Medvednica apud la rivero Sava. Zagrebo ĉiam troviĝis je la vojkruciĝo kaj estis ligilo inter Okcidento kaj Oriento, kunligante Mezeŭropon kun Adriatiko, Mediteraneo kaj la mondo. Ĝi estas urbo kiu malgraŭ sia grandeco sukcesis konservi sian animon kaj resti hommezura. Ĝia arkitekturo kaj la placoj de la Supra Urbo kaj de Kaptol, iom pli juna Suba Urbo, preĝejoj kaj memorskulptaĵoj atestas pri ĝia miljara historio kaj pri la riĉa tradicio, pri la konservita etoso de la pasintaj epokoj enteksita en la nuntempon je la nivelo de la eŭropa civilizo. Zagrebo estas kultura kaj scienca centro, universitata centro kun multnombra junularo.

Zagrebo proponas allogan gastronomion, ĝia proksima ĉirkaŭaĵo samkiel la pli fora estas unikaj. Vidinda urbo estas Zagrebo, kune kun siaj loĝantoj kiuj enspiras ĝian rekoneblan gastaman spiriton.

Zagrebo havas unu miliono da loĝantoj.

Tradicie zagrebanoj donacas al siaj gastoj ruĝan koroforman mielkukon. Tial ni nomas ĝin "la urbo kun miliono da koroj"

KONGRESKOTIZOJ (en eŭroj)

	ĝis	31.12.00	31.03.01	poste
1.-		120	150	180
2.-		150	187	225
3.-		60	75	90
4.-		90	112	135

- 1.-individua membro de UEA (ne inkluzivas MG)
- 2.-ne individua membro de UEA
- 3.-komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, mem individua membro de UEA
- 4.-kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA.

(aliĝiloj haveblaj en nia Asocio)

SOLIDARECE

Nia asocio pretas aliĝi al ĉiuj kondamnoj kontraŭ la Homrajtoj, ne nur lingvaj, kaj tiucele ni dankos ĉiujn sugestojn de niaj membroj, ĉar nia redakcio ne kapablas ĉion scii.

Ni mencias niajn lastajn solidarajn reagojn:

-Al la prezidanto de Costa Rica solidare kun la peto de la Movado Kontraŭ la Perforto pro la hejma perforto kaj murdo de virinoj kun postulo pri la leĝa agado de la polico tiukaze. (sugesto de Joan Inglada)

-Al la sendependisma partio Andecha Astur kun nia apogo pro diskriminacio de la astura lingvo. Principe oni rifuzis la kandidatecojn en astura lingvo en pasintaj ĝeneralaj elektoj, sed poste la Konstitucia Tribunalo akceptis ilin. Ni sincere gratulas ilin pro la sukceso. (iniciato nia surbaze de alvoko aperinta en ĵurnalo Avui). Ni informis IKEL-prezidanton kaj IKEL-membrojn katalunajn pri la alvoko kun peto de kunlaboro. Ni scias ke Daniele Vitali la prezidanto de IKEL reagis.

-Al la Asocio por la Novaj Bazoj de Manresa kun nia subteno al la Universitato Rovira i Virgili de Tarragona pro la agreso tie de la kataluna lingvo.

Ankaŭ ni reagis favore al Esperanto al la jenaj helpo-petoj:

-Al la E-Societo en Takatuki (Japanio) kun niaj salutoj por ĝia post 34 jaroj jam tradicia E-ekspono de longe agnoskita de la urba eduka komitato. Ni reliefigis ke nia saluto venas el Katalunio, la naskiĝlando de la mondfama arkitekto Gaudí, kiun la japanoj bone konas kaj admiras.

-Al la irana alvoko saluti la tiean lingviston Prof. Reza Anvar kiel pruvo ke Esperanto vivas en multaj landoj, ĉar ŝajne li opiniis ke E. estas jam forgesita afero. La peton ni ricevis trarete de la irana farmaciisto Farhad-Vessal. Espereble tutmonda reago renversos la opinion de la irana lingvisto.

Ankaŭ alia aspekto de solidareco estas la humanitara helpo kaj la sugesto de Senad Colic pri la ekkreo de "Esperantistoj sen limoj" estas pripensinda (vidu lian artikolon sur paĝo 5-a de nia lasta revuo n-ro 311 junio 2000 sub la rubriko *Nia Forumo*). Pri lia propono ne gravas la nomo, sed la intenco. Ĉu "Solidaraj Esperantistoj" estus pli taŭga nomo? Kio gravas tamen estas nia agado kaj tiusence ni katalunaj esperantistoj pruvis nian solidarecon per la kreo de *Espero-Katalunio* kaj per sporadaj helpoj humanitaraj, laste per tiu al la pola esperantistino. Ŝi ricevis jam nia monhelpo, kiu kvankam ne sufiĉa montros al ŝi ke solidareco ekzistas en la E-movado. Ŝi respondis kun elkora danko pro nia sincera helpo. Ni deziras al ŝi plej rapidan resaniĝon.

ĈU ONI BOJKOTAS KEA-N?

Temas pri la raporto de nia lasta Kataluna Kongreso okazinta en Manresa. Ni sendis ĝin siatempe kiel kutime al la revuoj Esperanto de UEA kaj Heroldo kun kelkaj fotoj, kaj neniu aperigis ĝin en siaj respektivaj eldonaĵoj. Plendinte pri la neapero, ni ricevis malklarajn pravigojn de ambaŭ redaktoroj. Kion pensi pri tio? Ĉu koincida fatalo aŭ klara bojkoto? Jen interesa temo por debati. Niaj membroj havas la parolon.

RENKONTIĜO EN GRENOBLE

Sur la rubriko *Nia Agado* en nia antaŭa revuo junio 2000 ni anoncis la okazigon de renkontiĝo en Grenoble (Francio) dum la tagoj 9, 10 kaj 11 de septembro. Ĝin ni devis prokrasti, pro la ne klara sinteno de la parenco kiu devis ricevi la honorigaĵojn. Se ni sukcesas klarigi la aferon, ni revenos kun nova propono.

SOMERA KURSO EN LA SEU D'URGELL

La anoncita kurso pri planlingvoj en la tiea universitato ne okazis, laŭŝajne pro manko de aliĝintoj. Ni pluinformos pri la kurso, se ĝin oni organizas por la venonta somero.

NIA AGADO

MAJORKA BULTENO

Ni bonvenigas la aperon de la 4-a numero de "Majorka Esperantistaro" la bulteno de niaj insulaj samideanoj, el kiu elstaras la omaĝo al la samideano Fernando Redondo kiu naskiĝis en Maono (Minorko) tre grava kaj aktiva esperantisto de 1907 ĝis sia morto en Meksiko je 1949.

PRI NIA FORUMO

La sola reago al la tri proponitaj tekstoj en nia antaŭa revuo, estas tiu de nia juna aktivulo Lluís Garcia Casademont, prezidanto de KEJ, kiun ni reproduktas:

"En tiuj ĉi tekstoj aperas du flankoj por debati: la unua temas pri la partopreno en –ni diru-politikaj aferoj; kaj la alia pri solvo de la lingva problemo en la mondo.

Pri la unua mi tute konsentas agadi ĉiamaniere por klopodi solvi la malbonfartecon de la homaro kaj konstrui alian plibonan socion.

Pri la dua mi havas la sekvan vidpunkton: estas klare ke ju pli da parolataj lingvoj des pli kultura riĉeco, sed multege da tiuj lingvoj kiuj malaperas hodiaŭ, malaperas pro la memvolo de ĝiaj parolantoj, kiuj pensas ke ili havos pli bonan estontecon se ili parolas alian lingvon, kaj se ni nin demandas kial tio okazas ni revenas al la unua ekonomi-politik-socia problemo.

Se ni volas klopodi eviti la malaperon de multaj lingvoj ni devas ne nur lukti kontraŭ la perforta malaperigo, sed kontraŭ tiu ĉi socio ene de kiu la tuta homaro vivas kaj kiu okazigas tiujn lingvo-problemojn.

Nur se ni solvas la socian problemon ni povos solvi ĉiujn homajn problemojn, ĉar ili ĉiuj devenas el ĝi."

RAPORTO PRI LA 56-A IJK-2000 EN HONGKONGO

Partoprenis en la karavano al IJK-2000, 15 homoj (gegermanoj, gefrancoj, svedoj, unu anglino, unu urugvajano, unu eŭsko kaj tri katalunoj, la KEJ-estraranoj Roger Prieto, Joan Rius kaj Lluís Garcia .

La karavananoj devis renkontiĝi en Moskvo la 17-an de julio kaj pro tio ni la tri katalunoj prenis aviadilon el Barcelono al Milano kaj el Milano al Moskvo. En tiu unua aviadilo al Milano ni renkontis Felip Artero, kiu ankaŭ vojaĝis al Milano por aliaj aferoj.

Ni alvenis al la Moskva flughaveno posttagmeze kaj tie atendis nin tri moskvaninoj: Irina, Sveta kaj Alla. Ili kunportis nin al sia hejmo kaj informis nin ke la aliaj karavananoj gastis en aliaj moksvaj domoj. La sekva tago Irina turismumigis ilin dum la tuta tago tra Moskvo kaj vespere ni renkontiĝis kun la aliaj karavananoj kaj festumetis.

Venonttage Irina akompanis nin al la ĉina ambasadejo en Moskvo, ĉar ili ne povis ricevi la ĉinan vizon en Barcelono pro manko da tempo. La moskva ĉina ambasadejo malfermis nur tri tagojn semajne kaj tri horojn tage, pro tio ni iris al la ambasadejo tri horoj antaŭ la malfermo por preni lokon en la vico. Surprizinde ni necesis nur unu solan matenon por ricevi la vizojn kaj la sekva tago ĉiuj karavananoj povis feliĉe foriri el Moskvo.

La venonta haltejo estis Tomsko, post du tagoj en la trajno kaj multege da memoraĵoj pri niaj kunvojaĝantoj. En Tomsko atendis nin kelkaj rusoj kiuj akompanis nin al lurba junulargastejo kaj al iu publika banejo kiu multe impresis nin. Tie ni ricevis la unuajn informojn pri la siberiaj iksodoj kiuj kunportis la encefalitan viruson, sed kiuj bonŝance ne loĝis en la urboj.

Ni ĉiuj partoprenis la esperantan renkontiĝon ORSEJT (Orienta Somera E-Tendaro) 70 km. for de Tomsko, sed mezsemajne kelkaj karavananoj ne povis plu suferi la amason da kuloj kaj reiris al Tomsko ĉe esperantistino. La ceteraj karavananoj kiuj restis en la tendaro havis tre bonan etoson malgraŭ la kuloj.

Ĉiuj renkontiĝis denove en Tomsko kaj prenis trajnon al Irkutsk, ĉar pro manko da lokoj en la trajno kiu preterpasis Mongolion ili finfine ne povis tiun ĉi preni kaj devis preni pli multekostan aviadilon el Irkutsk al la ĉina urbo Shenyang.

En tiu ĉi ĉina urbo 500 km. nordoriente de Pekino ni renkontis kelkajn ĉinajn esperantistojn kaj unu sola esperantistino kiu laboris kiel instruistino en tiu ĉi urbo en kiu loĝis ses milionoj da homoj. El tiu ĉi urbo ni prenis trajnon al Pekino kiu daŭris unu tutan nokton, dum kiu preskaŭ neniu sukcesis iom endormiĝi.

En Pekino la redakcio de "El Popola Ĉinio" pretigis por ni buson kiu turismumigis nin dum kelkaj tagoj tra ĉiuj vidindaĵoj en tiu ĉi tre granda ĉina urbo. Malgraŭ la prezo, la hotelo estis sufiĉe bona kaj ni sukcesis finfine duŝi nin.

La trajno el Pekino al Hongkongo estis multe pli bona ol la aliaj kaj multege pli rapida, ĉar daŭris nur unu tago kaj duono.

En Hongkongo ni atingis tre facile la kongresejon, sed tie ekis la kutmaj problemoj en la akceptado, kiujn ni feliĉe povis solvi.

La programo de la Kongreso estis sufiĉe bona sed mankis al ĝi noktaj aferoj kiel trinkejo kaj diskoteko. La varmego de la urbo dumsomere ankaŭ iomete malbonigis la Kongreson. Partoprenis en la Kongreso ĉirkaŭ 250 homoj, plejparte azianoj.

Post la Kongreso ni la tri katalunoj restis ankoraŭ tri tagojn en Hongkongo kaj estis tre rimarkinda la varmego kiun ni suferis.

Post ĉio raportita ni povas nur prezenti tre bonan bilancon de tiu ĉi vojaĝo.

Lluís Garcia Casademont

KEJ-prezidanto

EŬROPA JARO DE LINGVOJ

Konsilio de Eŭropo, en kiu membras preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo kaj kiu estas konata pro sia okupiĝo pri homaj rajtoj, kaj Eŭropa Unio deklaris la jaron 2001 Eŭropa Jaro de Lingvoj.

La du eŭropaj organizaĵoj strebas progresigi instruadon de lingvoj kaj levi la konscion de la granda publiko pri la valoro de lingva plureco en Eŭropo. Krom vasta informkampanjo, uzanta specialajn simbolojn kaj frapfrazojn, oni organizas amason da eventoj sur ĉiuj niveloj: tuteŭrope, plurlande, nacie kaj loke.

UEA subtenas la iniciaton de la eŭropaj organizaĵoj. La celoj de la Eŭropa Jaro de Lingvoj kongruas kun tiuj de la E-movado, al kiu ĝi donos okazon diskonigi siajn lingvo-politikajn celojn. Eĉ se la Jaro formale celas nur la lingvojn *rekonitajn de la membroŝtatoj* ĝi ja ebligas partoprenon ankaŭ de E-organizaĵoj per projektoj kongruaj al la celoj de la Jaro. Krome oni povas antaŭvidi, ke ĵurnalistoj k.a. interesitoj ne limigos sinnur al laŝtataj lingvoj sed povos interesiĝi ankaŭ pri la situacio de E-o kaj la perspektivoj por ĝia pli vasta uzo en Eŭropo.

La Jaro de Lingvoj prezentas ŝancon al agado por antaŭenigi la celojn de Kampanjo 2000, t.e. plialtigi la prestiĝon de la internacia lingvo, influi la internacian vivon, kaj levi la organizan kaj idean nivelon de la E-movado. La Jaro ricevos atenton i.a. en la traktado de la kongresa temo de la Zagreba UK, "Kulturo de dialogo-Dialogo inter kulturoj" kaj en la eldona agado de UEA, t.e. revuoj kaj libroj. Landaj asocioj devus atenti ĝin en siaj aranĝoj kaj eldonaĵoj kaj klopodi kiel eble plej multe kunlabori kun ne-esperantistaj asocioj kaj fakuloj.

Por evoluigi ideojn pri la esperantista kontribuo al la Jaro, estas formiĝanta kunaganta grupo kiun kunordigas Anna Ritamaki.

La adreso: Dragsfjardsvagen, 690, FI-25700 KIMITO, Finnlando, rete: anna.ritamaki@kolumbus.fi

(El Heroldo nro 11-12, 20 septembro 2000)

KAFE-RAPORTO

Ĉu vi ne iris KAFEn? Bedaŭrinde!

Emocio grandis, sed se oni devas raporti oni devas apartigi emocisentojn. Pro tio mi decidis ne raporti tute sekve kiam mi revenis hejmen post KAFE, ĉar mi pensis ke mi devis lasi la tempon pasi kaj kun longtempa perspektivo esti pli objektiva. Mi planis tion fari dum aŭgustaj ferioj sed finfine mi devis labori, krome eksterordinare, kaj tiu stresanta agado malsanigis min. Nun, ekde mia tempa labora malkapableco mi klopodos raporti pri KAFE, ĉar krom ŝati tion fari, tion mi promesis al KE-redaktoro. Aparte, mi ne havas bonajn fotojn ĉar mi ne konas sufiĉe mian novan fotilon kaj mi eraris en la elekto de la filmoj. Tamen iamaniere mi klopodos digne solvi la aferon.

La afero raporti ne temas nur pri objektiveco sed ankaŭ pri rigoro kaj ĉi tio prezentas aldonitan problemon. Mi amas arton, mi amas muzikon, teatron, plastikon, ktp, sed ĉu mi kapablas kaŭ (kaj/aŭ) rajtas raporti pri arto, plie pri kategorio alta festivalo?

Ĉiukaze, mi opinias ke Kategorio Alta Festivalo en Esperantujo povus ankaŭ esti la signifo de KAFE, t.e. Kultura Arta Festivalo de Esperanto.

Dum 5 tagoj, de la 5a ĝis la 9a de julio okazis tiu grandaĵo. Pli ol dudek koncertoj, oficialaj kaj alternativaj, pluraj teatraĵoj (muzikaj, tragikaj, kabaretaj, dancaj, fabelaj, mimaj, ktp), atelieroj diversaj (danclernado, joko, verklernado, pentrado, interreto, matematikaĵoj, muziko, ĥorkantado, kuk-kuirarto, ktp), tagĵurnalo, kulturekskursoj (Tuluzo historia, Kosmocentro, Albi), forumoj (artaj, literaturaj, ktp), omaĝoj ktp.

Por pliaj detaloj oni povas viziti la ttt-on de KAFE ĉe <http://perso.wanadoo.fr/kultur.art.festival.eo/eo>

Ĉar estis paralelaj aranĝoj kaj mi devis foriri la 9an matene, mi nur impresis priskribos tion kion mi ĉeestis kaj kompreneble tiel skize kiel mi kapablas.

La Kompanoj muzika kaj teatra grupo el Bordojo. Laboro ekzemplige nesuperebla, muziko serioze kaj profesie sinferema. La grupo prezentis sian lastan KD-on, **Survoje**, muzik-teatra verko, originale verkita en esperanto, en kiu partoprenas homoj el ĉiuj aĝoj. La rolantaj Kompanoj: Marie-Pol Rabiller, delikate sobra, Thierry Faverial, profesie pasia, Fabrice Morandeanu, muzikisto el la animo, Marcel Redoulez, ŝvitas homaramajn kvalitojn. La kunkantantoj estis absolute kortuŝaj. Pedagogie.

Jomo "Sola" akustika kantri-roko sed ĉefe amuziga kaj distriga. Jean-Mark Leclerc estas granda reganto de la scenejo kaj ankaŭ de la publiko. Artisto kompleta, plurlingva, tre bona kantisto kaj ne malpli bona gitaristo, almenaŭ por akompani siajn kanzonojn. Plezurege.

Muziko kaj Danco. Kim J. Henriksen prezentis dancospektaklon **La hundo lumas**. Ĉi tiu denaska esperantisto oferis al ni totalan spektaklon. La verko de Kim fluas inter infaneco kaj maljuneco, iras de la humoraj al la seriozaj aspektoj kaj de la klaŭnaj al agresivaj momentoj, travivante ĉiujn seksojn. Muzike ni povas aserti ke **La hundo lumas** akordiĝas kun unu el la plej nuntempaj artaj tendencoj, la arta reciklado. Li uzas -aŭ pli ĝuste re-uzas- diversajn esperantajn- aldona merito-muzikaĵojn el la lastaj kvardek jaroj. Arte

Solotronik-Elektronika tekno-muziko. Unuopa muzikgrupo. Edu Vargas, entuziasme sed maltrankvile, prezentis sian albumon **Polimorfia Arkitekna**, per kiu li montras sian seriozan laboron -li asertas- en la esploroj de tiurilate nova muziko, kiu ankoraŭ ne havas sufiĉajn adeptojn. Polimorfia kaj Arkitekna ne estas ambaŭ originalaj vortoj, laŭ la artisto asertas ĉe la prezentado de la KDisko; Krzysztof Penderecki (1933), nuntempa komponisto havas orkestran komponaĵon nomita **Polymorphia for 48 players (1961)**. Ekspekte.

Okazis omaĝa ceremonio por transdono al **D-ro Albault** de memorlibro **De A al B** -al kiu kontribuis dudeko da aŭtoroj- okaze de lia 75-a naskiĝtago far' R. Hauptenthal, kompilanto de la libro, kiu

reliefiĝis ke D-ro Andre Albault, krom pluraj jardekoj de daŭra aktiveco, estas aŭtoro de eseaj libroj, studoj pri la Fundamento, vortaro franca-esperanta, ktp.

Teatro Espero prezentis la spektaklon **Aniara** de nobelpremiito Harry Martinson (Svedio) tradukita de William Auld (Britio) kaj Bertil Nilsson (Svedio) kompilita por spektaklo de Gunnar Gällmo (Svedio). Jerzy Fornal, aktoro multfaceta kun rimarkinda karaktero, vivigis al ni spektaklon 45-minuta, konsistanta el universa detruo, iom romantika, ni opinias, ĉar eĉ roboto ne eltenis la detruon. Filozofian mesaĝon oni povas eltiri pri rilato inter privataj universoj kaj propraj cerboj. Pensige.

Ĵak Le Puil. Kanzone laŭ franca stilo, oni anoncas; eĉ akcente mi aldonus. La doĵeno de la e-artistoj atingis rapide niajn korojn. Lia sola sursceneja ĉeesto kaptis rapide kaj ĝisfine nian atenton. Lia aŭreolo plenigis la teatrejon. Li kantis antologie kaj ĉio sonis ĉarme, ironie, serioze, proteste..., Vive

Uchjo Duchesne rakontas ... Teatro Krizalido prezentis spektaklon konsistanta el rakonta kaj kanzona dramaturgio pri la Pariza Komunumo okazinta de la 18-a de Marto ĝis la 26-a de Majo 1871. Arno Lagrange, elan-rakonte, kun akompano de Kim J. Henriksen kaj JoMo (Jean-Mark Leclerc), muzike kaj kanzone -kaj kvalite, kiel kutime-, reprezentis sursceneje tiun eventon pri la justecaj revoj, la suferoj kaj la buĉado de la laborist-movadanoj. Revolucie.

Kore prezentis sian lastan K-diskon **Kia Viv'**. Estis granda surprizo: Unue, vivi la ĉarman etoson kreita inter muzikistoj kaj publiko. Due, malkovri en nia esperanta mondo tiun altkvalitan muzikgrupon pri rok-varietea stilo. Trie, rimarki la eksterordinaran voĉon de Kris. Kvare, konstati ke oni estas antaŭ ensemblo de spertaj, kompetentaj kaj altbonkvalitaj profesiaj instrumentistoj. Kaj kvine, atesti la pasion de la kantisto por la muziko, por esperanto, por la vivo finfine, kune kun la totala komplaceco de la aliaj muzikistoj. Revelacie.

Tiuj foraj nunaj trobadoroj **Jhomart kaj Natasha** alvenis en la landon de la pra-trobadoroj kaj okupis ilian belkantan podion; elfore venis kaj forigis ilin dum ilia prezentado. Rafinita muziko. Voĉoj fragile teneraj. Tekstoj subtilaj kaj delikataj. Verkoj entute plenaj de efektoj kun gusto el diversaj muzikaj kaj kantaj stiloj mondaj kio kune kun la lingvo faras ke ilia arto celas ne nur internaciecon sed ankaŭ homaramon. Enamiĝe.

Ĉu vi pretas por la veno de **Dolcxamar**? La novaĵo ne estas ke oni rep-hipopas kaj umas eĉ en esperanto sed ke tion **Dolcxamar** faras malfacilsupereble. Tiu finna muzikgrupo plenigis la teatrejon per tiu nuntempa muziko. Ĝiaj ritmoj freneze dancigis la ĉeestantojn kiuj ne haltis sekvante la muzikon kaj la drumbatadojn ĝis la fina elĉerpiĝo. Ŝvite!

Ne nur ŝvite, sed ankaŭ ribelige terure bruegadis **Trash Bog'** kaj **Hom-Faktor'**, mi supozas, ĉar mi ne memoras, sed tiuj estis la programitaj. Mi konsentas kun ili pri la enhavo de iliaj tekstoj kaj pri la senco de ilia bruo. Ili pravas: la maltoleremo, la hipokriteco, la ekspluatado, la mensogo, la avareco, la malamo, ktp, ĉiutage estas pli kaj pli abundaj. Rememoru nur la lastatempan "akcidenton" de la rusa submarŝipo en kiu sufokite mortis 118 homoj kaj neniu scias pro kia ŝtata kialo. Rememoru ankaŭ la monkompenson de 4.400 milionoj da pesetoj donitan al la antaŭa ĝenerala direktoro de la hispana kompanio Telefónica dum ekzistas homoj al kiuj oni neas glason da akvo. Aŭ ĉu la tekstoj de tiuj bruuloj ne pravas dum 20% el la homaro malŝparas la 80% el la mondaj vivrimedoj kaj la 80% el la loĝantoj de ĉi tiu blua planedo malbonvivas senrajte al preskaŭ nenio sed suferas ĉiujn klasojn de malsanoj kaj mankoj kaj mortas pro malsato? Kotopoe?!

JoMo kaj Liberecanoj eksplode rokenrolis kaj revolucie entuziasmigis la junajn kaj tiujn ne tiom junajn ĉeestantojn. Ruĝnigre kantis kaj dancigis nelacigeblajn revoluciulojn -almenaŭ spirite. Kaj sukcesis. Ilia stilo humur- kaj homarama revivigis la ĉiamajn protestojn kaj depostulojn paralele al invito sinamuziĝi kaj, ankaŭ grave, muzik-altkvalite. Spiritviglige.

KAFE-RAPORTO

Kiam tiel aplombe rokmuzikbando koncertas, oni povas aserti ke oni estas antaŭ veterana muzikgrupo. Se krom tio la ensemblo tiel serioze, nur-esperante kaj poezie muzikas oni devas aserti ke oni sin trovas antaŭ la plej veterana esperanta muzikgrupo **Persone**. La plej certa elmontrado ke oni regas aferon konsistas el memfido kaj sensânceliĝo; tio plus kapableco estas sinonimo de kvalito, tial de ĝuo, ambaŭflanke, kaj de la aŭskultantoj kaj de la interpretistoj. Je la fino oni rimarkis tian internan rideton ĉe la vizaĝo de la ĉeestantoj. Iom nostalgie, sed tre agrable kaj tre kontentige.

Se vi ne spektis la kabaretaĵon **Fraŭlino Emily Barlaston O.B.E.** (Ordeno de la Bruta Imperio), la plej bone-konata emerita Angla Prima Donna Dissoluta, mi povas aserti ke vi ne povas diri, ke pri kabaretaĵoj vi jam vidis ĉion. Tute ne. Serĉu en la vortaro ĉiujn adjektivojn pri teatro larĝe, alte, longe, tempe kaj multdimensie kaj apliku ilin al ĉi tiu teatraĵo.. Jes, ĉiujn adjektivojn, mi tute ne troigas. Ekde diboĉo ĝis inteligento tra ironio, ĉarmo, absurdeco, humuro, aparta talento, publika partoprenigo, ktp, ĉio spicita per glaso post glaso da medicina(?) gorĝa lubrikado igis la lirikan, kabaretan, skeĉan spektaklon perfekta, tute nekomparebla. Neforgeseble.

Mi memoras pri Solen' de kiam kun Arno Lagrange -**Teatro Krizalido**- prezentis la teatraĵon **Ĉu dio bojas?** ĉe la Kataluna Kongreso de Esperanto de Sant Cugat en 1985. Se tiam Solen' estis impresa, nun ŝi estis superba kaj mirinda ĉe la teatraĵo eltirita el evento, **Lasu la neĝon fali**, de Pierette Dupoyet, fenomena verkistino, aktorino kaj direktorino de la franca teatro kaj veteranino de la Festivalo Off de Avinyò (Okcitanio), kie ŝi prezentis ĝin - **Laissez tomber la neige!** - pasintjare, kun postaj reprezentadoj tra la tuta mondo.

Temas pri krimsimulado kiel frenezaĵo kiu enfermigas virinon en psikiatrian hospitalon. La ago okazas en dormoĉambro kiun ŝi nomas ĉelon. Ĉi- momente la intrigo elstariĝis, la spektatoro rilatigas ĉambron al malsanulino kaj ĉelon al krimulino. Post vana klopodo montri sian resaniĝon kaj post ok izolecaj jaroj ŝi redaktas depozicion por klarigi sian ruzaĵon kaj postuli enkarcerigon. Ŝi implikas la spektatorojn kiel atestantojn, sed... ĉu oni povas senpune ludi kun la frenezo? Ĉu oni eliras mens-senvunde post ok jaroj enfermita? Majstre.

Kanti al la diverséco, al la homaramo, al la kunamantoj, al la vivamo finfine, estas tio kion faras **Jacques Yvart**. Li rimarkigas al ni la bonon de la mondo por ke ni kapablu ĝui ĝin. Enamiĝinta de la maro ĉeestas fiŝkaptistajn kantajn renkontiĝojn kie li konatiĝis kun la membroj de Kajto, kiuj enkondukis lin en e-on. Ne estas necese diri ke li estas arta filo de Georges Brassens ĉar sia haŭto transpiras lian poezion. Trobadoro mondcivitana portis al KAFE tenerajn mesaĝojn el la tuta mondo. Kortuŝe.

Kajto ludas popolajn instrumentojn por akompani siajn, frisajn kaj nederlandajn krom multlandajn kanzonojn. Ili ne nur ĝuas multe kion ili faras sed scipovas transporti ilian ĝuon en la koron de la geaŭskultantoj. Belaj voĉoj akorde kun tre bona kombino de instrumentoj vivigas en la publiko la esencojn de ilia kulturo. Krome, Kajto kunkantis kelkajn kanzonojn kun Jaques Yvart kaj, dimanĉe matene, instruis frisajn popoldancojn, kion la ĉeestantoj multe ĝuis. Ĉio kune estigis tre bonan etoson. Varme.

Eksterprograme, trapasis la festivalon **pola koruso**, nur unuhoron dimanĉe matene. Alvenis aŭtoĉare, survestiĝis kostume kaj tre vigle, entuziasme kaj belsone plenigis la belan sunan matenon per des pli belaj kantoj. Kiam foriris, tuj post la ĝojiga kantado niaj koroj parte kuniris. Birdfluge.

Bedaŭrinde estis aliaj programeroj kiujn mi ne povis ĉeesti: *Kaj Tiel Plu*, *Desperado*, *Edith Van de Roest*, *Véronique Girard*, *Les Footeuses de Oai*, *Vigla Muziko*, ktp. eĉ forumoj, atelieroj, ktp, kiel *Jogo* gvidita de Rose-Marie Lavaud, *Horkantado* gvidita de Zdravka Bojcheva, *Trajno Fabelo* gvidita de Marcel Redoulez, *Pentrado de la Trajno* gvidita de Isabelle Jacob kaj Claudine Pomirol, *Popoldancoj* gvidita de Kim Henriksen, *Eŭskaj Popoldancoj* gviditaj de Rafa Blanco, *Verkado*, baza ateliero gvidita de Liven Dek, *Matematikaj Ludoj* gvidita de Jacques Caubel, *Ritmoludoj* gvidita de

Thierry Faverial, *Artista Forumo* gvidita de Marcel Redoulez, *Verkado baza ateliero* gvidita de Liven Dek, *Vizito de la urbo Tuluzo* gvidita de Catherine Gallego kaj Jacques Caubel, *La Kolekto 2000 sur la reloj* gvidita de Marcel, Bruno kaj la infanoj, *Horkanta Koncerto* post la staĝo gvidata de Zdravka Bojcheva helpe de Marie-Pol Rabiller, *Chalaparta Pirinea* muzikilo gvidita de Rafa Blanco, *Literatura Forumo*, la grupo NIFO, sciencfikcia libroserio "Sferoj", gvidita de Miguel Gutierrez, *Vizito de la Kosmo-Muzeo* gvidita de Jacques Caubel. ktp.

Anekdote menciis la prezentadon de la tiel nomata "Ibera skolo" fare de Liven Dek, kie li prezentis la membroj laŭ kulturoj, t.e., Gonçalo Neves el la portugala, kaj Georgo Camacho, Liven Dek, Miguel Fernández kaj Abel Montagut el la hispana. Laŭvorte.

Mi kore kaj sincere gratulas kaj dankas la KAFE-teamon kaj la gekunlaborantojn, kies nomojn mi ne volas menciis ĉar certe mi forgesus iujn, pro tiu nemezurebla organizado. Dankon al ĉiuj

Speciale meritas ke mi parolu pri Marcel Redoulez, kiu krom membriĝi ĉe **La Kompanoj** estis la homo pli gratulita kaj dankita de la artistaj grupoj pro liaj tradukoj aŭ lingvohelpoj. Plie li gvidis atelierojn kaj forumojn kaj respondecis pri la tagĵurnaloj. Tiam grandan kunlaboron nur eltenas homo kun specifaj elstaraj ecoj. Marcel disradias Freinet-movadajn kvalitojn. Mia unua partopreno en internacia esperanta aranĝo estis ĉe Freinet-movada medio kaj krom ricevi grandan impreson mi eklernis distingi tiujn specimenuojn. Gratule.

Finfine diri ke KAFE estis kategoria evento. Ne estis anekdoto. **Floreal Martorell**, atingis la arenon de l' kategorio. Tion faris li, la granda, rimarkinda, giganta, kolosa organizanto, nekomuna kaj unika impresario, kun la kunlaboro de ĉiuj, geartistoj, teamo kaj gepartoprenantoj. Krom diri ion kulture novan, en la raŭmdeklaracia senco, oni povas aserti ke ankaŭ en tiu fako, esperanto-movado atingis unuan nivelon. **Nepre daŭriginda!!!**

Joan Inglada Vilanova i la Geltrú



La aŭtoro kun sia edzino

INTERNACIE

KONGRESA REZOLUCIO

De la 85-a Universala Kongreso de Esperanto,

kunveninta en Tel-Avivo, Israelo, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2000, kun 1212 partoprenantoj el 61 landoj,

deklaras ke

-en tiu ĉi Internacia Jaro por la Kulturo de Paco necesas refortigi la tutmondajn klopodojn trovi komunajn kulturajn valorojn kaj interkonsentojn cele al konstruo de tutmonda Kultura de Paco;

-tio ĉi okazos nur se en la mensoj de la homoj ni komune kreos tiun kulturon, ĉar daŭra paco estas konstruata nur en la mensoj de homoj;

-en tiu ĉi mondoparto, la Meza Oriento, kie kunvenas malsamaj kulturoj, kaj kie riĉa historio samtempe unuigas kaj dividas homojn, apartaj streboj estas bezonataj kaj jam farataj en serĉado de paco;

-kondiĉo por paco estas la respekto de ĉiuj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj inkluzive de la lingvaj rajtoj de ĉiuj konfliktantaj grupoj;

-la internacia lingvo Esperanto estas kreita ĝuste por ebligi kulturon de paco inter malsamaj gentoj, kaj pro sia neŭtraleco kaj pro sia rekono de la digno kaj samvaloro de ĉiuj homgrupoj ĝi donas grundon, sur kiu valoroj de paco povas flori;

alvokas

ĉiujn internaciajn organizaĵojn, ĉiujn registarojn kaj ĉiujn homojn:

-ke ili decide ekrespektu la lingvajn homajn rajtojn cele al lingva kaj kultura demokratio en la mondo kaj subtenas la klopodojn de la Esperanto-movado en tiu kampo;

deklaras

la pretecon de la Esperanto-movado:

-plulabori por kulturo de paco en la mondo surbaze de reciproka respekto kaj egalvaloro de ĉiuj gentoj kaj hom-grupoj grandaj kaj malgrandaj;

-agi ĉie, kie paco estas minacata, apoge al la ceteraj klopodoj de la internacia komunumo;

esprimas

-sian admiron kaj subtenon al la klopodoj de ĉi tiu regiono, kiuj laboras por krei la eblecon

de kulturo de paco, kiu estas antaŭkondiĉo por veni al situacio de paca kunvivado kaj de respekto ambaŭflanka de la homaj rajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj por ĉiuj.

JARKOTIZOJ POR 2001

Ni informas la abonantojn de UEA kaj Monato pri la novaj kotizoj por 2001:

UEA-kategorio/prezo MG-1200 p-toj
MJ(T) 3.000 p-toj; MA(T) 7.400 p-toj; SA 4.700 p-toj; PT 9.000 p-toj.

Monato

Revuo..... 5.300 p-toj

Agendo La Jaro 850 "

(Fruaj mendantoj antaŭ la 1-a de decembro pagos la saman pasintjaran kotizon, t.e.: 5.000 kaj 750 p-tojn)

El Popola Ĉinio

Por la abonantoj de ĉi tiu revuo, ni peras jenan malĝojan informon, kiun ni ricevis el la tiea redakcio:

"Ekde la jaro 2001 ni ĉesos presi la revuon, sed daŭrigos la eldonadon rete. Pro tio ni ne plu abonigos la revuon."

Ni elkore bedaŭras la malaperon de la bela kaj enhavriĉa ĉina revuo, ĉar kun ĝia malapero la esperanta kulturo ankaŭ malriĉiĝas.

17-A INTERNACIA FESTIVALO -IF

La ĉi-jara IF okazos en Trier de la 27-a de decembro 2000 ĝis la 3-a de januaro 2001. IF temas pri aranĝo por mezaĝuloj (personoj 25-55 jarojn aĝajn) kaj familioj, kun aŭ sen infanoj.

Aliĝilon petu al nia Asocio.

KORESPONDPETOJ

Marina kaj Vano, studentoj en 8-klasa mezlernejo volas korespondi pri lernado, sportoj kaj vojaĝoj. Vin turnu al:

Vano Ĵukovskij (Interklubo Esperanto)

60 let Oktjabria 6-135

RU-628606 NIGNEVARTOVSK-6

(Rusio)

Douglas Mättey, 22-jara studento pri fremdaj lingvoj kaj lingvistiko kaj kiu laboras kiel tradukisto-instruisto kaj informatika programisto deziras korespondi. Jen lia adreso:

Douglas Mättey

P.O.Box, 394-7050

CARTAGO (Costa Rica)

DUA KONGRESO DE LA EŬROPAJ VERDAJ PARTIOJ

Okazinta en Parizo je 26/28 de februaro 1999.

Jen ĝia rezolucio pri Esperanto:

A:

La internacia lingvo Esperanto devus esti elektebla kiel opcio en eŭropaj lernejoj, ĉar ĝi estas neŭtrala kaj facile lernebla. Esperanto subtenas la komprenon kiamaniere lingvoj funkcias. Ĝi estas ideala ponto por superponti la interspacon inter la kulturoj.

B:

La internacia lingvo Esperanto devus iĝi unu el la oficialaj lingvoj de la EP-/EU-sistemo kiam la principo de la "egalrajteco de la lingvoj" devas esti haltigata. Post la EU-etendiĝo tiu ĉi principo ne plu estas uzebla simple pro teknikaj kaŭzoj. La neŭtrala lingvo Esperanto iĝos la reprezentanto de tiaj lingvoj, kiuj ne estos elektataj kiel oficialaj labor-lingvoj en la EP-/EU-sistemo.

Subskribis: Victor Cavaco (PT), Solange Fermex (FR), Natalie Kirvalidse (GE), Daniel Jositsch (CH), Marton Vargha (HU).

La komitato de la EVFP kunmetis ambaŭ rezoluciojn kaj decidis interrete.

Fine de septembro 1999 la konsilio de la EFVP kunsidis en Bratislava. Martin Minich kaj lia kolego reprezentis tie AVE-n por informi kaj eble defendi nian rezolucion. Sed ne necesis defendi ĝin, do nia rezolucio estas akceptita de la EFVP (Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj).

Ĉi supraj nur konfirmis mian ideon ke fakte la Verdaj Partioj estas la plej taŭga politika helpilo por Esperanto.

Tial mi rekomendas al la esperantistoj kiuj intencas aktivigi politike: elektadu verdajn partiojn! Por tiuj kiuj ne intencas aktivige politike... multas ankaŭ verdaj asocioj kaj organizoj.

Kompreneble, la E-organizoj (UEA, TEJO, landaj asocioj...) restu plene neŭtralaj, sed la esperantistoj-unuopuloj estu tiuj, kiuj agados por Esperanto interne de plej diversaj politikaj kaj nepolitikaj (ankoraŭ)

neesperantistaj organizoj kaj firmaoj.. Zoran Ciric

ESPERANTISTA KULTURDOMO NE POVAS MALAPERI

Ekde 1964 E-o estas instruata en la Federa Universitato de Ceará en la urbo Fortaleza, kie okazos la 87-a UK en 2002. Mia instruisto Paulo Amorim Cardoso emeritiĝis kaj lin anstataŭis mia frato Adelson Alves Sobrinho. La domo kie dum multaj jaroj funkciis la E-kursoj staras antaŭ Placo Gentilândia, kie oni starigis buston de Zamenhof.

Oni translokigis la E-kurson al malgranda domo kaj ili deziras ĉesigi la E-agadojn ĉe tiu universitato. Ĝuste nun kiam la tieaj esperantistoj jam ekagas por okazigi la 87-a UK.

Ni ne povas permesi ke la Esperantista Kulturdomo de UFC malaperu. Tial ni petas al la monda esperantistaro, bonvolu sendi leterojn, kartojn al la rektoro petante ke li redonu la lokon al la E-kurso kaj pli grave ke li daŭre apogu la E-kursojn, precipe nun, ĉar en tiu urbo okazos la 87-a UK.

Bonvolu fari tion en Esperanto kaj/aŭ en unu el la lingvoj instruataj tie, nome: portugala, hispana, itala, franca, angla, germana kaj rusa. Se vi instruas E-on en universitato kaj povas sendi leteron en oficiala presita letero kun la nomo kaj adreso de via universitato, des pli bone.

Al redaktoroj de gazetoj kaj radio-programoj mi petas bonvolu diskonigi tiun urĝan alvokon.

Aristóphio A. Alves Filho

Jen la adreso de la UFC-Rektoro:

Universidade Federal do Ceará (UFC)
Magnífico Reitor Roberto Cláudio Frota Bezerra
Reitoria Da UFC
Av. da Universidade, 2853-Benfica-Fortaleza-CE-Brazilo BR-60020-181

EŬROPA ANGULO

ALVOKO AL LA ESPERANTISTOJ POR LA FEDERISTA MANIFESTACIO

La prezidanto de la Eŭropa Federista Junularo sendis al la esperantistoj la jenan mesaĝon:

“Karaj geamikoj esperantistoj,

Kiel vi scias, la 7an kaj 8an de decembro la ŝtatestroj kaj registarestroj de la Eŭropa Unio kunsidos en Nico (Francio) por konkludi la diplomatian konferencon taskitan reformi la instituciojn de la EU.

Bedaŭrinde, malgraŭ tio ke Eŭropo troviĝas antaŭ grandegaj defioj, ekde la historia defio pri la plilarĝigo al la landoj de Centra kaj Orienta Eŭropo, Nico produktos nur novan malfortan kaj nesufiĉan Traktaton.

Tial la 7an de decembro la poreŭropaj kaj federistaj organizaĵoj de la tuta Eŭropo, kaj vasta reto el ne-registaraj organizaĵoj kaj civitanoj estos en Nico por granda eŭropa supro de la civitanoj, por postuli la politikan unuecon de Eŭropo, eŭropan federacian Konstitucion, por diri “jes” al eŭropa federacio malfermita al la aliĝo de ĉiuj landoj, kiuj tion volos.

Mi bone scias ke vi – kiuj malkovris en la ideo de lingvo tutmonda potencon ilon de unuiĝo de la homoj, trans ĉia lingva, kultura kaj nacia barilo- de ĉiam kredas je la batalo por la politika unueco de Eŭropo, kaj esperas do ke vi ne volos foresti en tiu ĉi historia rendevuo.

La 7an de decembro, tra la stratoj de Nico, ni postulos la Eŭropan Konstitucion en ĉiuj lingvoj de Eŭropo. Invitante vin marŝi kune kun ni, mi esprimas la deziron ke inter ĉi lingvoj ne manku Esperanto, lingvo de ĉiuj homoj de Eŭropo kaj de la mondo.

Kiu deziras kuniĝi kun ni, ricevi informojn aŭ la detalan programon povas turni sin al la Eŭropa Sekretariejo de Young European Federalist: secretariat@jef-europe.org tel.+32.2.512.0053 kaj fakso + 32.2.512.6673

Paolo Vacca

Prezidanto de JEF Europe

LA CIVILA SOCIO KAJ LA ĈARTO DE LA RAJTOJ

Kiel reprezentanto de Itala E-Federacio mi ĉeestis la 3an de novembro en Romo renkonton de reprezentantoj de pluraj asocioj kun la Ministro pri Eŭropuniaj Aferoj Gianni Mattioli. Ĉeestis kaj raportis la reprezentantoj de la tri Cefaj laborsindikatoj italaj kaj la sekretario de la federista intergrupo ĉe la Eŭropa Parlamento Virgilio Dastoli.

La temo estis la perspektivoj de la Nica “suprokunveno” de la 6-7-8 de decembro, precipe rilate al la Ĉarto de la Fundamentaj Rajtoj de la Eŭropa Unio kaj ĝiaj sekvoj.

La antaŭvidoj pri la rezultoj de la Supro estas ke la Ĉarto estos solene proklamita, sed ĝi ne eniros en la Traktatojn. Tamen la opinioj de multaj juristoj estas ke, malgraŭ la ne-eniro en la traktatojn, ĝi havos grandan valoron, ĉar la Supera Justic-Kortumo de la Unio, kaze de juĝo pri afero koncernanta unu el la punktoj de la ĉarto, ne povos preteratenti dokumenton proklamitan de la registarestroj de la 15 ŝtatoj de la Unio.

La metodo sekvita por kompili la Ĉarton, nome doni la taskon al “konvencio” konsistanta el reprezentantoj de la Eŭropa Parlamento kaj de la Naciaj Parlamentoj, kun aŭskultado de la socio, montriĝis fruktodona.

Italio estis la sola lando en kiu okazis pluraj publikaj kunvenoj kaj debatoj pri la temo, tiel ke la italaj reprezentantoj alportis al la konvencio la postulojn ricevitaĵojn de malsupre, de la socio. Ĝuste tial, al la itala delegitaro estas atribuitaj 70% de la modifoj faritaj al la teksto de la Ĉarto inter la versio de la 28-a de julio, de multaj juĝata neakceptebla, ĝis la versio de la 14-a de septembro.

La metodo estas plusekvenda; oni devas forpreni la taskon konstrui Eŭropon for de la interregistaraj konferencoj, kiuj ĉiam konkludiĝas kun la plej malalta rezulto. Tuj post Nico devus starti nova konvencio. Ĉiukaze oni komencos novan kampanjon, kun debatoj kaj aŭskultadoj de la socio, kun la celo pretigi la vojon al Eŭropunia Konstitucio, en kiu eniru la plejbono de la Ĉarto de la Rajtoj, sekvota de dua parto pri la institucioj.

La Ministro Gianni Mattioli asertis ke la socio devos larĝe partopreni en tiu kampanjo kaj aŭdigi sian voĉon. Ĉiuj partoprenantoj konsentis pri tio.

Estas interese rimarki ke Italio estis ankaŭ la sola lando en kiu, dum la preparado de la Ĉarto, oni parolis ankaŭ pri Esperanto. Tion faris mi en dukunvenoj. Kaj laŭ mesaĝo aperinta el la diskutlisto “eŭropo”, en germana gazeto oni citis la fakton, ke en Italio dum la diskutoj pri la Ĉarto oni levis la temon “esperanto”.

Do mi forte atentigas ĉiujn esperantistajn asociojn de Eŭropo pri la neceso ne foresti en la debato. Ni devas ĉeesti en la “civila socio” kaj alporti nian vidpunkton kaj niajn postulojn. En Italio ni povis fari tion ĉar la Itala E-Federacio estas aliĝinta al la Itala Konsilio de la Eŭropa Movado kaj tial ĝi regule ricevas invitojn partopreni en tiuj kunvenoj.

Mi dezirus scii, kiuj aliaj landaj asocioj estas aliĝintaj al la sialandaj Konsilioj de la Eŭropa Movado kaj kiuj estas iliaj reprezentantoj en la organoj de la Konsilioj.

Tiu ĉi mesaĝo turnas sin ankaŭ al la landaj asocioj de la “kandidataj landoj” ĉar pretigo de eŭropa konstitucio interesas ankaŭ iliajn landojn.

Amikajn salutojn,

Umberto Broccatelli –prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio